Novaĵoj Tamtamas
Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo) エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Hama-Ronda Tago
— prilumita: historio de japana E-movado —

Sibayama Zyun'iti

En la 20a de aprilo, okazis en Esperanto-Muzeo Jokohama, "Hama-Ronda Tago", kun paroloj. Ili ĉi-foje prilumis diversajn facetojn de la historio de japana Esperanto-movado. Ĉeestis 21 personoj. Jen estas la programo, kaj poste mi prezentos kelkajn el la ĉefaj enhavoj.

La programo

13:30 Malfermo: Saluto de Sibayama, i.a. pri la 10-jariĝo de NPO Esperanto-Jokohama (vidu la aprilan numeron)

13:40 Prelego de s-ro Watanabe Tuyosi, instruisto de Lernejo Seikei en Tokio, "Pri Kuroita Katumi kaj Akademio Seikei-gakuen"

14:30 Parolo de Doi Ĉieko, "Vizitinte Ekspozicion pri Kuroita en Hasami-tyo" (vidu p.2)

14:45 Paŭzo

15:00 Prelegeto de s-ro Sibayama Zyuniti: (1) Rudolf Hugo Dick, svisa e-isto veninta al Jokohamo, (2) Kaĵino Joŝiko, jokohama e-isto irinta tutmonden (poste ŝi fariĝis Schmidt Yoshiko per internacia geedziĝo)

15:30 fino: poste libera parolado ĝis fermo de la muzeo je 17:00

Pri Kuroita Kacumi

Kuroita Kacumi (1874-1946) estas konata kiel renoma historiologo en Japanio. Li estas unu el la plej fruaj adeptoj de Esperanto, kaj multe kontribuis al Esperanto-movado. Li eksciis pri Esperanto en 1902, unu el la fondintoj de Japana Esperantista Asocio en 1906, tiujare redaktis E-Japanan Vortaron. Li retiriĝis el oficiala pozicio en Esperantujo en 1920, kiam la nova Japana Esperanto-Instituto fariĝis la centro de E-movado, sed lia dediĉo al Esperanto daŭris ĝis lia vivofino. Li tamen estas ideologie naciista, kaj estis tipo de 'naciisto-esperantisto', kontraŭe al 'internaciisto-esperantisto' aŭ 'proleto-esperantisto'.

S-ro Watanabe studis pri li, kiel temo de lia postdiploma kurso. Tiu studo fariĝis unu el la motivoj, ke Muzeo en Urbeto Hasami, la naskiĝloko de Kuroita, ekspoziciis pri li ankaŭ rilate al Esperanto. Kaj nia Muzeo helpis la ekspozicion per pruntado de materialoj, ekzemple la E-Japana Vortaro.

preleganto Watanabe Tuyosi
kaj sur la ekrano Kuroita Kacumi

■ Eldonas NPO Esperanto Jokohama ■ Redaktas : Sibayama Zyun'iti, Noriko
■ Adreso: Nagatahigasi 1-19-1, Minami-ku, Yokohama-si,
Kanagawa-ken, Japanio (JP-232-0072)
■ Redaktejo: tamtamo@eo-jokohama.bona.jp ■ TTT-ejo: http://www.esperanto.yokohama/
■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-i (Jokohama Esperanto-Rondo)

Pri Akademio Seikei

La preleganto, s-ro Watanabe, nun estas instruisto de Lernejo Seikei en Tokio. Tiu lernejo originis de Akademio Seikei, fondita antaŭ la Dua Mondomilito. La prafondinto, Nakamura Haruzi estis lingvopolitike "latinigisto" de la japana lingvo, mem lernis Esperanton, kaj invitis esperantistojn prelegi en sia lernejo. Rezulte, multaj esperantistoj naskiĝis el tiu ĉi akademio. La historio pri tiu Esperanto-grupo malmulte restas en la nuna lernejo. Estas kelkaj dokumentoj lasitaj en nia Muzeo montras ties agadon.

Vizito al la urbo Hasami, la hejmloko de Kuroita Kacumi

Doi Ĉieko

En la 5a de novembro lastjare (2024), mi kun s-inoj Cukada Juuko, Kamimura Kazumi, kaj mia edzo, vojaĝis al la urbo Hasami en Gubernio Nagasaki, la hejm-urbo de Kuroita Kacumi. S-ino Cukada estas nova esperantistino, kiu eklernis Esperanton 20 kelkajn jarojn antaŭe en la urbo Koobe, sed tio ne daŭris longe, ĉar ŝi transloĝiĝis al Jokohamo. Ŝi rekomencis lerni Esperanton en marto de la lasta jaro, sub mia gvido.

Pri nia vojaĝo al Hasami, laŭ mia rekomendo ŝi volonte konsentis vojaĝi kun ni. Ŝia artikolo en Esperanto aperis en NT, en decembra numero de 2024.

Kial okazis tiu ĉi afero, mi volas paroli iomete. Ĉar la Muzeo en la urbo Hasami planis havi la ekspozicion pri Kuroita Kacumi, elstara homo, kiu devenis de la urbo Hasami, kaj por fari la ekspozicion la muzeo komencis kolekti materiarojn pri Kuroita kaj Esperanto. Ĉe la muzeo estis multaj materiaroj pri Kuroita, sed malmulte pri Esperanto, kaj kiel Kuroita okupiĝis pri Esperanto, estis ne klare. Tial oficistoj de la muzeo demandis kunhelpon de Japana Esperanto-Instituto. Kompreneble en JEI estas materialoj pri Kuroita, avangarda persono en Esperanto-movado en Japanio, sed oficistoj de JEI estas okupitaj pri ĉiutagaj aferoj ĝeneralaj, kaj do ili petis helpon de nia Esperanto-Rondo. Kaj tial ni faris laŭeblan kunlaboron al JEI kaj al la muzeo en Hasami. La muzeo povis okazigi la ekspozicion, supozeble sukcese. Kaj la oficistoj de la muzeo proponis ankaŭ nin viziti la muzeon. Tiel ni vojaĝis al la muzeo en la lasta novembro.

En la 5a de novembro, marde, ni kvarope ekflugis de la flughaveno de Haneda al tiu de Nagasaki. En Urbo Nagasaki ni vizitis kelkajn lokojn famajn, sed nun mi ne parolos pri tio. Post turismado en kelkaj famaj lokoj, kiujn mi jam vizitis antaŭe, ni vespermanĝis en iu restoracio, ni ĝuis turismon en la urbo, kaj poste al hotelo.

En la sekva tago ni turismis iomete en famaj turismaj lokojn en la urbo, kaj poste ni iris al Hasami, la hejmloko de Kuroita Kacumi.

Unue ni vizitis la muzeon de Hasami, kie estis kaj estas ekspoziciataj Kuroita Kacumi kaj Hukuda Kijoto. Pri la literaturisto Hukuda Kijoto mi parolu: Kiam li estis lernanto de mezlernejo, li ĉeestis la kunvenon de parolado de Kuroita Kacumi, tiu Hukuda emociiĝis multe kaj decidis studi japanan literaturon.

Pri Oosugi Sakae, samtempano de Kuroita Katumi

Kuroita (nask. 1874) estis homo, ĝenerale kun naciisma tendenco. Lia subteno al Esperanto devenis unuflanke de la ideo "protekti japanan kulturon kontraŭ ondo de eŭropismo". Nu, samtempano Oosugi Sakae (nask. 1885) estis anarkiisto kaj lia ideo estis iasence kontraŭ tio de Kuroita. Sed Kuroita estis amika al Oosugi. Do kia persono estis Oosugi? Pri tio rakontas Doi Ĉieko.

(redaktoro)

Pri Oosugi Sakae: li ne estis serioza kaj lernema knabo. Krom lernado en lernejoj, li estis okupita pri amaferoj kaj aliaj. Pro tio instruistoj en lernejo ne tre bone taksis lin, kaj li estis forpelita de la lernejo. Tamen li sukcesis havi bonan rezulton en ekzamenoj. Post lernado en mezlernejo li interesiĝis pri politikaj aferoj kaj komencis partopreni en la socialisma kaj poste ankaŭ anarkiisma movado. Ankaŭ pri amo li estis

fervora. Siatempe li amis al Itoo Noe kvankam li jam edziĝis al alia virino. En tia tempo li vundiĝis, tranĉite de alia virino, Kamiĉika Iĉiko, en restoracio nomata *Hikage-ĉaja*. Tio estis nomata la Afero *Hikage-ĉaja*. Kvankam li estis vundito, homoj havis simpation al Kamiĉika. Kamiĉika estis metita en karceron dum 2 jaroj. Tio estis konata afero tiam en Japanio. Post la dua mondmilito, en 1955 ŝi fariĝis deputito de socialista partio.

Krom politikaj aferoj, ŝi konatiĝis kun Eroŝenko, kaj helpis publikigi liajn verkojn en gazeto. Kvankam ŝi ĉeestis en Esperanta kunveno, ne estas fakto ke ŝi lernis Esperanton.

Mia vojaĝo en Tsushima (3)

Landlima insulo kiu allogas koreajn turistojn

NAMBA Fumiharu

Memoraĵo-butiko kaj loka restoracio, kontrastaj

Je la 9a de oktobro 2024, post la tranokto en hotelo Toyoko-Inn de urbo Izuhara, matene mi denove ekveturigis la luaŭton al suda parto de la insulo Tsushima.

Kvankam en la urbo Izuhara staras multaj konstruaĵoj, veturigante aŭton en pli sudan parton de la insulo, domoj malmultiĝas kaj vojo eniras profundajn montojn. La geografio de insulo estas tre montoplena kaj marborda linio estas tute kompleksa. Troviĝas multaj malgrandaj golfoj, kaj ĉe kelkaj golfoj estas malgrandaj havenvilaĝoj. Antaŭ ol modernigo, inter tiuj vilaĝoj oni ne instalis sufiĉajn vojojn kaj la loĝantoj ĉefe utiligis boatojn por transportiloj. Eĉ nun la aŭtovojoj tra la montaro estas iom mallarĝaj por grandaj aŭtomobiloj. Dank' al malgrandeco de "*Wagon R*", mi sekure ĝuis veturadon en la suda parto de Tsushima.

Kiam mi eniris en vilaĝon Tsutsu (豆酘), sur Google-mapo mi trovis unu malgrandan butikon de lokaj produktaĵoj kaj memoraĵoj. Ja, mi iru kaj butikumu tie, tamen legante la recenzojn en Google-mapo mi iomete sentis strangecon. Jen "Japanaj turistoj nepre iru.", jen "Apudlandaj produktaĵoj ne ekzistas, tial kredinde." ktp...

Mi parkis aŭton ĉe la butiko kaj eniris tien, kaj mi komprenis. La vendaĵoj estas bonaj kaj aĉetindaj, tamen sur muro troviĝas grandaj flagoj de Japanio, unu estas kutima Hinomaru kaj la alia estas armea flago *Kyokujitsu-ki* (kelkfoje oni traktas ĝin kiel la simbolon de naciismo). Multlingvaj afiŝoj tute ne ekzistas. La mastro de butiko kviete sidas ĉe giĉeta tablo, kaj ĉe la flanka ŝranko viciĝas naciismaj libroj kaj gazetoj. Nu... mi iomete sentis maltrankvilecon. Mi butikumis kaj aĉetis kelkajn lokajn produktaĵojn. Kvankam la mastro estis bonkora, lia mieno estis iomete severa.

Elirinte la butikon, mi ekveturigis aŭton al vojo tra arbara montaro. Por tagmanĝo mi jam trovis unu restoracion per Google-mapo. Kelkdek minutojn veturigante, en arbaro mi atingis la restoracion " らん亭 "(Ran-tei). Sur muro de la domo oni metis bonvenigan afiŝon. Kontraste de la butiko en Tsutsu, la afiŝo estis skribita en la japana, la angla, kaj la korea. Ekz. troviĝas frazo

"Menuo korelingva estas preta." en Hangulo.

En la restoracio, kvankam la domo estis sufiĉe granda, mi estis nur unu gasto tiam. La plej

gustuminda kuiraĵo ĉi tie estas loka nudelaĵo *Rokubee*, farita de fermentinta amelfaruno el batato. Mi mendis la lunĉon de *Rokubee*. Atendinte la manĝon mi rigardis afiŝojn en la manĝejo. Jam kelkaj koreaj televidaj teamoj vizitis kaj prezentis la restoracion, tial kelkaj afiŝoj pri tiuj koreaj TV-programeroj troviĝas sur la muro.

La nudeloj *Rokubee* estis iom dika kaj bruna, kaj manĝante tion mi miris pro tiu unika sento al dento. Ja, estas speciala sperto de loka kuirarto en Tsushima. Mi ĝuinte finis la tagmanĝon, kaj la mastro de la restoracio venis. Li prezentis pri la farado de nudeloj *Rokubee*, kaj aliaj diversaj aferoj. Mi demandis pri eksterlandaj turistoj en Tsushima, kaj li rakontis pri la akceptado de tiuj turistoj.

Tiu restoracio situas preter larĝa aŭtovojo kiu trairas montaron. Tial iu loka kompanio de turisma buso petis la mastron por tagmanĝado de turistoj. Kaj la restoracio preparis sufiĉe vastan parkejon por busoj kaj komencis akcepti la turistojn.

“Ni jam longe akceptis multegajn turistbusojn kaj servis lunĉojn al multaj eksterlandaj turistoj. Tamen, preskaŭ ne okazis problema afero.” Dirinte la mastro ridetis.

Nu... Mi iomete komprenis. En tiu insulo Tsushima, kiu situas ĉe landlimo, ekzistas ambaŭ tendencoj; naciisma kaj internaciisma. Pro la landlimo, oni devas gardi sian naciecan koron de patrujo, kaj dume oni devas fronti al vizitantoj tra la maro kun honesta koro. Ambaŭ du tendencoj estas pro la landlimo kaj ili povas esti ne divideblaj.

Jen estas Tsushima, la ejo de japana spirito, kaj la ejo de internacia konatiĝo.

Postparolo: reirvojo de Tsushima al Jokohamo

Posttagmeze, mi revenis la urbon Izuhara, kaj redonis la luaŭton “*Wagon R*” ĉe parkejo apud la haveno. En ĉi-vespero, por mia lasta vespermanĝo tra la vojaĝo, mi vere ĝuis lokan sakeon kaj bongustajn marangilojn.

Je la sekvanta mateno, la 10a de oktobro, mi enŝipiĝis en pramŝipon “フェリーちくし” (Ferry Chikushi) de la haveno Izuhara al Hakata. En la ŝipĉambro troviĝis kelkaj gejunuloj surhavantaj armeajn uniformojn. Mi jam trovis ĉe la haveno kelkajn armeajn kamionojn por transporti ion al Kiuŝuo. Post la ekveturo la soldatoj tuj dormis kun malstreĉa mieno. Ankaŭ mi iomete dormis en la ŝipĉambro.

Post 4 horoj da veturado, la pramŝipo proksimiĝis al haveno Hakata (en urbo Fukuoka). Mi rigardis la pejzaĝon de haveno sur la ferdeko. Mi finfine finis la vojaĝon tra Koreio, kaj tra la insulo Tsushima...

Atinginte la havenon Hakata tagmeze, per buso mi tuj iris al la stacidomo Hakata. De Hakata al Shin-Yokohama (en mia hejmurbo Jokohamo), oni bezonas nur 4 kaj duonan horojn uzante rapidan trajnon Shinkansen. (fino)

sezonvorto maja

Hirundoj ツバメ

Okita Kazumi



De aprilo ĝis julio, ili migras al Japanio kaj zorgas pri siaj idoj. Pro tio, ili estas birdoj kiuj sciigas al ni la alvenon de somero. Por sin protekti kontraŭ naturaj malamikoj, ili konstruas nestojn en lokoj, kie homoj ofte eniras kaj eliras, do la voĉoj de la idoj petantaj manĝaĵon ofte aŭdeblas proksime.